

**Vivu kiel homo! Vivu kiel vi estas!  
Liberiĝu nin el malracia diskriminacio!**



**SAT  
Ĉielarka  
Frakcio**

Oni ne devas vivi kiel "ino" aŭ "viro",  
same kiel ni ne devas vivi nur kiel "ia landano".  
SAT-Ĉielarka Frakcio konsistas el ĉiuj,  
kiuj volas la mondon tia, ke oni nature akceptas  
ekziston de homoj diversseksaj kaj iliaj diversaj vivstiloj.  
Ĉielarko estas simbolo de harmonio  
en gradeco al diversaj koloroj.  
Ĉiu homo lokiĝas sur iu punkto de  
kontinuaĵaj spektroj senintence.  
Oni rajtas havi diversajn  
orientiĝojn, karakterojn kaj vivstilojn  
respektante homan dignon reciproke.

Ni uzas Esperanton por komuniki kun homoj, kiuj loĝas disde en la tuta mondo. Esperanto estas internacia lingvo kreita racie. Ĝi estas relative pli facila lingvo ol aliaj lingvoj por lerni, ĉar ĝia gramatiko estas ordigita regule, enkondukante vortojn el pluraj lingvoj ĉefe Euxropaj. (Eĉ "GUINNESS" agnoskas Esperanton, kiel la lingvon kun la plej malmultaj malregulaj verboj.) Dum pli ol 100 jaroj, ĝiaj uzantoj praktikis la komunan, neŭtralan kaj egalan lingvon, Esperanto. Kvankam ĝi estas plej aktive uzata en Euxropo, ankaŭ en Azio, Ameriko, Oceanio, kaj Afriko troviĝas homoj, kiuj povas komuniki per Esperanto.



Ideoj de esperantistoj kaj iliaj grupoj estas fakte ne unuecaj, relative diversaj. La grupo "SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda)" estas unu el tiaj esperantaj grupoj. SAT estas mondskala organizo, ne surbazita sur ŝtataj landlimoj. Ĝi estas kolektivo de individuoj, kiuj volas solidariĝi reciproke, transirante nacion, ŝtaton, aŭ diversajn konscie inventitajn kadrojn. SAT-anoj apartenas al plej diversaj partioj kaj sociaj kaj ekologiaj movadoj. Kelkaj el ili organizas sin ene de SAT en tiel nomataj "frakcioj". Ĉielarka Frakcio estas unu el tiuj frakcioj. Por membriĝi al Ĉielarka Frakcio ne necesas SAT-membreco, sed oni devas havi volon por interkomunikiĝi per Esperanto.



Por lerni Esperanton, oni povas aĉeti vortaron kaj lernolibron en la ŝranko de "Eksterlandaj lingvoj" en granda librovendejo. Plie, nunepoke interreto estas progresinta, tial oni povas gajni (elŝuti) senpage dosieron de lernolibro kaj vortaro por Esperanto. (ATENTU: Tio estas stato de Japanio pri Esperanto)

Inter esperantaj grupoj troviĝas alia grupo, kiu speciale okupiĝas pri seksminoritatoj, nomata "Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG)". Ni kunlaboras kun ĉi tiu grupo.

### **Aktuala Konkreta Rezultato de Ĉielarka Frakcio**

- ◆ 2004/06  
Unu membro partoprenis en la parado en Leicester (Britio) kiel gitaristo de kvira muzika bando.
- ◆ 2005/07  
Frakcia kunveno okazis en Zagrebo (Kroatio). En la kunveno, ni diskutis pri leĝa agnosko de familiiĝo por samseksaj paroj en Hispanio kaj laborstato kaj sociala pozicio de inoj, ktp.... El Francio, Irano, Hispanio, Kroatio, Serbio, Japanio kaj Svislando partoprenantoj kunvenis.
- ◆ 2005/08  
SAT-ĈF partoprenis en la lesba kaj geja parado en Tokio kiel patrono. Unu membro partoprenis fizike. El Francio, Kanado kaj Usono kuraĝiĝaj mesaĝoj per esperanto venis.
- ◆ 2005/09  
En Sennaciulo (organo de SAT), raporto pri la parado en Tokio aperis.
- ◆ 2005/10  
SAT-ĈF partoprenis en la filmfestivalo en Kagawa (Japanio) kiel patrono.

## **SAT Ĉielarka Frakcio**

<http://satesperanto.free.fr/frakcioj/cf/>  
[cxielarko@ml-d3.infoseek.co.jp](mailto:cxielarko@ml-d3.infoseek.co.jp)